


Bulgara **ESPERANTISTO**





Sindone laboras Asja Faraĵan, gvidantino de E-kursoj en Varno (p. 5)



Sukcese finiĝis E-kurso sub la gvido de L. Grozdanov (p. 5)



ENHAVO

* * Fer la Blugiloj de Fureco — al brila TEJO-kongreso	1
* * Informoj pri la 63 ^a UK de Esperanto	3
* * Al la tutmonda esperantistaro	3
V. kaj E. Ĉirpanski. La Semajno de Internacia Amikeco	4
Boris Kavalĝiev. E-teatro en Ruse	5
Lazar Andreev. Viola grado E-antaŭ la 63-a UK	5
* * Interŝanĝo de pedagogia sperto	5
* * Honora Verda Tabulo	6
D. Haĝiev. Radio Moskvo elsendis en Esperanto	6
* * Kontraŭ la otomana tiraneco leviĝis ankaŭ: rumanoj, finnoj, poloj, hungaroj, ĉeĥoj kaj slovakoj	7
Prodan Prodanov. Estingita fajro	8
Dimitro Denĉev. Pentraĵekspozicio de D. Haĝiev	8
Lili Andreeva. La heroaĵo de kapitano Georgiev	11
Lila Zaharieva. La prabulgara kulturo	12
M. Delkur, J. Amuru. 150 jaroj ekde la naskiĝo de Jules Verne	13
* * Metodika E-kurso en Ateno	14
* * Lingvaj problemoj en UNO	14
* * La Unuigintaj Nacioj eldonas dokumentojn en Esperanto	14
Asen Linov. La monstro	15
* * Akad. Mihail Arnaudov forpasis	III
* * Nekrolegoj pri Venelin Drumev, na Kukuŝeva, Ksencion Jankov	III
* * Tra la gazetaro. Deziras korespondi	IV

Sur la koprilpaĝo:

Vidaĵo el Veliko Târnovo — la urbo de la 34-a TEJO-kongreso: La fama Stambolov-ponto

Redakta Komitato:

Kunĉo VĀLEV (ĉefredaktoro), Nevena ALEKSIEVA, Marin BĀCEV, bjuba BOJAĜIEVA, Ĥristo GOROV, Asen GRIGOROV, Dimitro DENĈEV, Dimitro HAĜIEV, Krâstju KARUCIN, Haim LEVI, Vasja FETROVA.

Korektis: Rajna Konstantinova

Sofio, p. k. 66

Tel. 31-00-29

Kelkjure jam Rajna Konstantinova el Sofio subtenas viglajn amikajn rilatojn kun Arturs Kubulnieks el Ziemeļi, Latvia SSR, kaj lia E-rondeto „Fajrero“. Ŝi sendas al ili leterojn, librojn, memordonacojn.

Sur la foto: La junaj fajreranoj, ornamitaj per mart-ornamaj „martenica“, senditaj de R. Konstantinova.

**PER LA FLUGILOJ DE L' JUNEKO — AL BRILA TEJO-KONGRESO!**

Glora estas la vojo de la bulgara Esperanto-junularo en la pasinteco. Edukitaj en la spirito de profunda amo al la popolo, al la libereco kaj justeco kaj inspirataj de la alta idealo pri konkordo, amikeco kaj kunlaboro inter la popoloj, por paco sur la tero, la junaj bulgaraj esperantistoj estis ĉiam en la unuaj vicoj de la batalantoj kontraŭ la monarkofaŝisma tiraneco kaj ekspluatado. Ardaĵ esperantistoj estis tiaj bonegaj junaj filoj kaj filinoj de nia popolo kiel Stojan Edrev, Cvetan Spasov, d-ro Vârban Genčev, Kosta Aleksandrov, Valentin Andreev, Emi Šekerĝijski, d-ro Stojan Vasilev, Dičo Petrov, Vela Peeva, Stojan Kalpazanov, Stefan Škodrov, Penka Miĥajlova, Stilijan Peŝev kaj centoj da aliaj, kiuj pereis en la fajro de la kontraŭfaŝisma batalo kiel komandantoj kaj politikaj komisaroj de partizantaĉmentoj, kiel kaŝantoj kaj helpantoj de partizanoj, kiel membroj de sekretaj batalgrupoj ka. Hodiaŭ iliaj nomoj estas sanktaj standardoj por la tuta bulgara junularo, por nia tuta popolo.

Nun la junaj bulgaraj esperantistoj daŭrigas la aferon de la karaj pereintaj herooj. Ili kun ardo partoprenas la konstruadon de nova vivo en nia lando kaj per la internacia lingvo Esperanto laboras kaj batalas por nova mondo — mondo de komprenigado kaj amikeco inter la popoloj, de feliĉo por ĉiuj homoj. Ilia ĉiujara partopreno en internaciaj E-kongresoj, konferencoj, festivaloj, simpozioj, renkontiĝoj, laborbrigadoj ka. certigis por ili senduban aŭtoritaton kaj konfidon. Esprimo de tiu konfido estas ankaŭ la antaŭstaranta 34-a Internacia Junulara Kongreso, kiu okazos je 22—29 de julio en nia malnova ĉefurbo Veliko Târnovo. Sed tiu konfido samtempe estas granda devigo. La 34-a Kongreso devas transformiĝi en novan imponan manifestadon de la amikeco kaj unueco de la tutmonda E-junularo. En tiu manifestado la junaj bulgaraj esperantistoj devas esti je la unua loko. Sed por tio ne sufiĉas nur la bona deziro, por tio estas necesa ankaŭ bona preparo.

La unua tasko dum la preparado por la kongreso estas la plialtigo de la lingva nivelo de la junaj esperantistoj. Sen bona regado de nia elprova paca armilo — la lingvo Esperanto — ne povas esti plenumitaj bone la taskoj kaj la sindevigoj, kiujn prenis sur sin la juna bulgara esperantistaro, akceptante esti dommastro de la TEJO-kongreso. Sen bona parola regado de la lingvo ili povas rakonti nek pri la glora pasinteco de la bulgara E-junularo kaj la cetera junularo, nek pri la glora nuntempo de nia liberama popolo, nek pri la hela estonto, kiu ĝin atendas — la estonto de tutpopola feliĉo kaj bonstato en plej progresinta homa socio. Tial la junaj esperantistoj devas maksimume klopodi pri bona refreŝigo kaj plua altigo de sia lingva nivelo en diversgrataj E-kursoj, parolantaj rondoj, per internacia korespondado, aktiva partopreno en diskutadoj dum E-kunvenoj kaj diversaj aliaj E-aranĝoj. La junaj esperantistoj devas observi konscie la plej efikan regulon: ĉiam kaj ĉie paroli inter si

nur en Esperanto! Nur tia praktiko kondukos ilin al korekta, libera kaj flua regado de nia lingvo.

Tre grava tasko de la junaj esperantistoj estas altiri novajn centojn da bulgaraj junuloj lerni Esperanton, eniri nian E-movadon. La junaj esperantistoj devas kun ardo kaj sindonemo partopreni la diversflankan vivon de la junularaj E-societoj kaj grupoj. Kie ne ekzistas memstara junulara societo aŭ grupo, ili devas plenforte partopreni la vivon de la ĝenerala E-societo, doni al ĝi junan sangon kaj entuziasmon. Honore al la 34-a Kongreso la junularaj E-societoj kaj grupoj devas havi regule ĉiusemajne kunvenon en konstanta tempo kaj loko kaj tiel kutimigi la membrojn al regulaj kunvenoj, al regula societa vivo. Apartajn zorgojn oni devas havi pri la tagordo de la kunvenoj — ĝi devas esti ĉiam interesa kaj varia: prelegoj kaj diskutadoj je interesaj temoj, traktado de bonaj artikoloj kaj literaturaj materialoj el la E-gazetaro, prezento de ĵurnalo parolata ka., organizi amuzvesperojn kaj E-balojn, ekskursetojn al vidindaj lokoj, renkontiĝojn kun E-junularo el aliaj loĝlokoj ktp.

Necesas ankaŭ ke niaj junaj esperantistoj invitu siajn eksterlandajn leteramikojn partopreni la kongreson en V. Târnovo.

Grandan atenton la junaj esperantistoj devas doni al sia persona partopreno en la kongreso mem: ili devas aktive kontribui por la sukceso de ĉiuj diskutrondoj kaj la kulturaj programoj. Ili devas bone prelegi, oratori, diskuti, reciti, kanti, danci ktp. Estas necese, ke ili anticipe preparu sin por bone prezenti al niaj eksterlandaj gastoj la bulgarajn popolkantojn kaj dancojn, ankaŭ la bulgarajn naciajn kostumojn, muzikinstrumentojn ktp. Ĉiumomente, en ĉiu loko ili devas manifesti altan disciplinon kaj kulturon, agrablan ĝentilecon, sinceran helpemon. Nur tiel ili bone prezentos sin mem, sian landon kaj popolon.

La samajn kvalitojn ili devas manifesti ankaŭ en Varno, kie la plimulto el ili — kune kun kelkmiloj da esperantistoj el ĉiuj anguloj de la planedo — partoprenos en la majesta forumo de la monda esperantistaro — la 63-a UK de Esperanto. En la programo de tiu kongreso estas antaŭviditaj ankaŭ kelkaj junularaj aranĝoj — fakkunsidoj, balo ka. Kaj post la UK sekvos la Internacia Arkeologia Junulara E-Brigado, kie la junaj bulgaraj esperantistoj same devas esti modelo de alta labordisciplino kaj konscio, de plej bona amika sinteno en la kolektivo.

Ni ne dubas, ke ankaŭ nun la bulgara E-junularo digne plenumos siajn esperantistan kaj patriotan devojn!

Antaŭen al brila okazigo de la 34-a Internacia Junulara E-Kongreso en Veliko Târnovo!

GRATULTELEGRAMO DE NIAJ SOVETAJ AMIKOJ

Karaj bulgaraj geamikoj, pasis jarcento ekde tiu neforgesebla tago, kiam via lando ekpaŝis sur la vojo de sendependa evoluo. La triumfa fino de la Rusa-Turka Liberiga Milito 1877—78 ĉesigis la barbaran politikon de perforto kaj subpremo, daŭrintan preskaŭ kvin jarcentojn. La bulgara popolo eltenis, ĝi konservis siajn konscion, lingvon, riĉan kaj originalan kulturon. Okaze de la 100-jara jubileo de la liberigo de Bulgario el osmana jugo ni sendas varmajn salutojn kaj bondezirojn al la frata bulgara popolo. Estu ĉiama kaj nerompebla la amikeco inter niaj popoloj, fortiĝinta per la sango verŝita en la komuna lukto! Vastiĝu la kunlaboro de niaj landoj en agado por fortikiĝo de la paco kaj amikeco inter la popoloj de nia planedo!

Komisiono pri Internaciaj Ligoj
de la Sovetaj Esperantistoj





63-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Varno 29. VII — 5. VIII. 1978

VIZITO DE KKS EN LA KONGRESURBO

Jam trian fojon KKS, s-ro Power, vizitis Sofion kaj la kongresurbon Varno lige kun la organizado de la 63-a UK de Esp-o.

En kunsidoj kun LKK en ambaŭ urboj KKS ricevis konkretan bildon pri la nuna stato de la praktika preparo de la kongreso.

Evidentiĝis, ke la kongreso vekis grandan intereson inter la esperantistaro. Jam en la komenco de marto la nombro de la aliĝintoj atingis 2460. La aliĝado daŭre progresas. Oni atendas (laŭ sufiĉe fidindaj prognozoj kaj anticipaj petoj pri rezervigo de lokoj) aldonan aliĝon de ĉ. 1000 personoj.

La optimistoj esperas eĉ al pli granda nombro de aliĝintoj. LKK prenas la necesajn zorgojn kontentigi la bezonojn de ĉiuj kongresanoj.

LA ĈEFREDAKTORINO DE „HEROLDO“ VIZITIS BULGARION

La ĉefredaktorino de „Heroldo de Esperanto“ s-ino Ada Fiĝiera—Sikorska entreprenis turisman vojaĝon tra Bulgario por akiri pli plenan personan imagon pri la kondiĉoj de kongresado kaj ekskursado de la partoprenantoj en la 63 UK en Varno.

Si vizitis multajn urbojn, ie eĉ sukcesis fari interesajn kunvenojn kun esp-istoj, vizitis kulturajn kaj turistajn vidindaĵojn, renkontiĝis kun LKK-anoj en Sofio kaj Varno.

Sendube, tiu vizito helpas ŝin en la propagando de la 63-a, kiu promesas esti unu el la plej amase vizititaj universalaj kongresoj.

GRANDA INTERESO PRI LA INFANA KONGRESETO

Pri la Infana Kongreseto en Varno estas granda intereso. Oni tamen ne forgesu, ke la kandidatoj al ĝi devas esti elektitaj laŭ la rekomendoj en la speciala aliĝilo. Ne eblas kontentigi la petojn de iuj landoj, kiuj deziras disponi aparte pri dekoj da lokoj en la Kongreseto.

AL LA TUTMONDA

ESPERANTISTARO

En 1975 la Monda Packonsilantaro (MPK) publikigis novan „Stokholm-alvokon“, kies tekstoj ni sendis al 115 naciaj kaj internaciaj esperantistaj organizoj kaj gazetoj kun nia propra komento. Tiu alvoko vekis grandan eĥon tra la tuta mondo kaj jam ricevis pli ol 400 milionojn da subskriboj. Tamen ŝajnas, ke granda plimulto de la esperantistaj asocioj kaj gazetoj ĝenerale ignoris ĝin.

Ni perfekte komprenas, ke ĉiu esperantista asocio havas siajn proprajn celojn kaj problemojn. Krome, multaj volas nepre observi la principon de politika neŭtraleco por ne ĝeni la poresperantan agadon en ĉiuj medioj. Ankaŭ certe ne mankas samideanoj, kiuj vidas en la pachtalo kaj en MPK ian komunistan kaptilon, aŭ simple opinias, ke tiaj iniciatoj ne povas haltigi la vetarmadon, aŭ kutimiĝis al la nuna vivo, sub minaco de nova katastrofo, kvazaŭ tio estas neevitebla.

Al tio ni povas koncize respondi:

1. Se neŭtraleco pri partipolitikaj aferoj estas en iuj kondiĉoj komprenebla, neŭtraleco pri paco kaj milito signifas neŭtralecon pri vivo kaj morto. Ĉu tio estas imagebla, des pli kiam oni deklaras sin heredanto de d-ro Zamenhof, arda apostolo de la paco? Ĉu tia abdiko pri nia respondecas estas inda por homa estaĵo?

2. Nova mondmilito estus katastrofo por la tuta mondo kaj milfoje pli ruiniga ol ĉiuj antaŭaj konfliktoj. Paca kunvivado inter landoj kun malsamaj reĝimoj estas do absolute necesa, kio postulas haltigon de la vetarmado. La romkatolika religio kondamnas ĝin. Tio certe ne estas rezulto de „komunista“ intrigo, sed de serioza analizo de la situacio kaj ties eblaj konsekvencoj. Kial la esperantista movado ne farus similan analizon?

3. La vetarmado en la pasinteco

ĉiam kondukis al milito. Silenti signifas akcepti. Kaj akcepti tiun politikon signifas permesi militon, frue-malfrue, kiu detruos nin aŭ niajn idojn. Ni turnas nin al via konscienco: ĉu vi pretas surporti tiun teruran respondecon?

4. Ni ne postulas, ke vi konsentu pri ĉiuj analizoj kaj pozicioj de Monda Packonsilantaro kaj de MEM. Ni simple proponas al la tuta esperantistaro, ke ĝi postulu ĉesigon de la vetarmado, ĝeneralan simultanan kaj kontrolatan malarmadon kaj pacan kunvivadon fare de ĉiuj registaroj senescepte. Ĉu eblas fari pli saĝan kaj pli realisman proponon, kaj kiu povas malkonsenti?

Neniu registaro povas militi sen la konsento de sia popolo. Ni vivas en epoko, kiam la popoloj povas trudi sian volon, kaj ĉio dependas de ilia agado. La esperantistoj vivas sur nia terglobo kaj estas koncernataj kiel ĉiuj aliaj homoj!

5. Nun prezidento J. Carter (Karter) volas konstrui novajn terurajn armilojn, notinde la abomenan, sa-

tanan neŭtronbombon, kiu detruus ĉian vivon kaj ne difektus la konstruaĵojn, uzinojn kaj materialojn. Li tiel endanĝerigas la vivon de la tuta homaro, relanĉas la vetarmadon, ke neniu preteksto povas pravigi tiun akcelon de la kurado al morto.

Ni solene petas la tutan esperantistaron tuj agadi, kune kun ĉiuj pacamantoj en la tuta mondo, por ĉesigi tian frenezaĵon kaj postuli politikon de malarmado kaj paca kunvivado. La nuna situacio estas tro grava kaj tro danĝera por plue silenti!

Praktikaj konsiloj:


Ni konsilas al vi kunlabori kun aliaj pacorganizoj, kaj notinde kun la t. n. „pacmovado“.

Vi povas turni vin al Monda Packonsilantaro, Lönnrotink 25 A, 6 krs HELSINKI 18, Finnlando, aŭ al nia movado (MEM): W. Gilbert, ĝenerala sekretario, 30 rue Croix-Montoire, 37100 TOURS, Francio.

Vi povas turni vin al naciaj aŭ lokaj packomitatoj, al naciaj sekcioj aŭ perantoj de MEM.

SEKRETARIATO DE MEM

LA SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO



Amikeco trans limoj

Diversmaniere (per kunvenoj, salutletoj, montrofenestroj, murgazetoj ka.) la bulgaraj esp-stoj notis la jam tradician SIA. Jen informoj pri kelkaj aranĝoj:

Veliko Târnovo. La urba E-societo „Lumo“ organizis en la Junulara Domo kunvenon dediĉe al SIA, kiun ĉeestis ĉ. 80 esp-stoj kaj neesp-stoj. Bulgarlingvan raporton je temo „La lingvo de la internacia amikeco“ faris K. Vălev, sekretario de BEA. Juna kantistino, akompanata de junulara orkestro, plenumis bele kantprogramon.

Dospat. Enkadre de SIA la loka E-societo „Fajrero“ organizis grandan balon. Nur por la balo estis rezervita la salono de

la moderna restoracio „Bor“, speciale ornamita per E-materialoj. Malantaŭ la podio de la orkestro estis du grandaj afiŝoj prezentantaj la terglobon kaj verdan stelon. Super ili — impona slogano: „Esperanto—paco—amikeco!“

Ĉeestis pli ol 160 esp-istoj kaj iliaj gastoj, precipe junularo, ankaŭ multaj gvidantoj de la soci-politika kaj kultura vivo en la urbo.

Sub E-melodio de la orkestro la balon malfermis V. Ĉirpanska kaj Biser Mollov. Sekvis salutoj kaj kantoj. En la nomo de CE de BEA la ĉeestantojn salutis k-do Kunĉo Vălev, sekretario de BEA kaj ĉefredaktoro de „BE“, kiu emocie parolis pri la nobla laboro de la esp-istoj en konstruado de paco kaj amikeco inter homoj kaj popoloj en la mondo. Liaj vortoj faris fortan impreson.

Salutojn prezentis ankaŭ la sekretario de UK de BKP k-do Koluŝev, kiu dankis la utilan laboron de la esp-istoj por la patriotisma kaj internacia edukado de la civitanoj, aparte de la junaj homoj. Li deklaris



sian deziron ellerni Esp-on kaj oni tuj enmanigis al li lernolibron.

Per siaj salutvortoj la sekretario de UK de la Dimitrova Junkomunista Unuiĝo k-do Kuclev substrekis, ke la plimulto de la lokaj esp-istoj estas junuloj.

Salutis la ĉeestantojn ankaŭ la direktorino de la loka gimnazio „D. Blagoev“ k-dino Darakčieva, ka. Ĉiuj substrekis, ke la E-fajrero en Dospat jam estas fajro, kaj pli konvena nomo por la societo estas „Flamo“. Tiu flamo jam brulas en la koroj de pli ol 200 esp-istoj.

Okazis interesa viktorigo, elekto de „Mis Esperantobalo“ (s-ino Bojka Grozdanova) ka. La dancoj kaj amuzado daŭris ĝis post noktomezo.

Tiaj baloj estas tre efika propaganda formo de Esp-to, speciale inter la junularo. Oni devas plurloke organizi E-balojn.

V. kaj E. Ĉirpanski

ORGANIZA VIVO

UTILA KUNAGADO

E-societo „La 48-a Universala Kongreso“ ĉe uzino „Vorošilov“ en Sofio kune kun popola legejo „Goce Delčev“ organizis elementan E-kurson por 20 personoj diversaĝaj sub la gvido de Ljuben Grozdanov. Sukcese finis la kurson 16 esp-istoj.

Ekde la unua de marto la kurso daŭrigas sian laboron kiel duagrada. El la novaj samideanoj 6 jam aliĝis al la UK en Varno.

E-TEATRO EN RUSE

Entuziasmoj ĉe la urba E-societo „Libero“ kaj el la E-sekcio ĉe la junulara domo de ŝipkonstrua uzino „Ivan Dimitrov“ en Ruse fondis esperantistan dramtrupon. Ĝin gvidas k-do Georgi Dobrev, prezidanto de „Libero“. Reĝisorino estas k-dino Nadja Sirkova.

La unua spektaklo de la trupo okazis la 24-an de januaro sur la scenejo de salono en „Transpred“. Venis multnombra publiko por spekti la komedieton „La gastino“ de la skota aŭtorino Sibil Sli. Antaŭ la komedieto estis prezentita belarta programo sub la gvido de k-do Buĉukov.

La artistoj amatoroj ludis tre bone. La publiko rekompencis ilin per viglaj aplaŭdoj.

Fine de januaro la komedieto „La gastino“ estis prezentita ankaŭ enkadre de VARE en u. Kubrat.

Boris Kavalĝiev

Sindona esperantista geedza paro — Velurina kaj E-iril Ĉirpanski, ĝeinstruistoj, ĉefaj gvidantoj de la E-movado en u. Dospat

VIGLA E-AGADO ANTAŬ LA 63-A UK

E-societo „Fajrero“ ĉe la Distrikta Popola Soveto en Varno ekzistas nur du jarojn, sed ĝi jam atingis tre bonajn sukcesojn. La societo nombras 130 membrojn, kiuj vigle partoprenas ĝian vivon. Ĉiuj estas regule kotizintaj kaj abonintaj nian organon „Bulgara Esperantisto“.

Ĉe la societo funkcias 3 kursoj por kometantoj. Du (kun entute 27 partoprenantoj) estas gvidataj de nia sindona s-anino Asja Karajan. La trian (kun 12 partoprenantoj) gvidas Lazar Andreev. En la kursoj studas la Internacian Lingvon ekonomikistoj, financistoj, inĝenieroj, agronomoj, kantistoj ka. Ĉiuj fervore sin preparas por la grava evento — la 63-a UK.

„Fajrero“ solene celebris la Internacian Tagon de la Virino — la 8-an de Marto. La prezidantino de la societo k-dino Markrid Karajan faris priokazan raporton. Oni enmanigis florojn al ĉiuj virinoj kaj memordonacetojn al la aktivulinoj.

Estis prezentita belarta programo. La kunveno finiĝis per E-kantoj.

Lazar Andreev

INTERŜANĜO DE PEDAGOGIA SPERTO

E-societo „Flamo“ en Kjustendil organizis interŝanĝon de sperto inter la instruistoj kaj kursgvidantoj de Esp-o en la urbo.

Praktikan lecionon en sia E-klaso faris Marija Labova, diplomita E-instruistino. Tuj post la leciono sekvis malgranda sole-naĵo: du el la lernantinoj festis naskiĝtagojn kune kun siaj kunlernantoj kaj la gastoj. La klaso prezentis malgrandan programon el E-kantoj kaj recitaĵoj. Kreiĝis sincera esperantista etoso.

La leciono de s-ino Labova estis pridiskutita. Oni esprimis dankon al la bonega E-pedagogo.





HONORA VERDA TABULO

En la abonkampanjo de „Bulgara Esperantisto“ por 1978 j. nia aktivulo KIRIL KALČEV el Loveĉ, membro de E-societo „Espero“, kolektis 60 abonojn.

Sekvu lian ekzemplon! Ni nepre atingu 6100!

INSTRUISTA E-KURSO

La bultenforma „Informilo“ pri la instrulaboro de BEA vekis viglan intereson pri Esp-o inter la instruistoj de Meza Politeknika Lernejo „Aristo Smirnenski“ en u. Septemvri, distrikto de Pazargik. La 17-an de februaro tie ekfunkciis E-kurso por 11 geinstruistoj sub la gvido de Dimitro Titerjakov, instruisto.

RADIO MOSKVO ELSENDIS EN ESPERANTO

La 4-an de februaro 1978 Radio Moskvo elsendis, enkadre de sia unuhora itallingva programo, ankaŭ programon en Esp-o, kiu estis ripetita la sekvan tagon. Ĝi entenis paroladon de la konata soveta esp-isto veterano docento S. N. Podkaminer el Lenigrado pri la historio kaj la nuntempa stato de la soveta E-movado, informoj pri la agado de la sovetaj esp-istoj, aparte pri tio, kiel ili preparas sin por la Olimpiado en 1980 en Moskvo (responde al demando de itala esp-isto) kaj plenumon de litovaj kantoj en E-traduko.

Ciuj bulgaraj esp-istoj, kiuj havis la eblecon aŭskulti la programon, estas ege kontentaj pri ĝi. Ĝia enhavo estis riĉa kaj interesa, Precipe interesa estis la parolado de k-do Podkaminer. Grandan ĝuon liveris al la aŭskultantoj la plenumo de la kantoj. La voĉo de la kantistino estis mirinda. La kantoj sonis bele en Esp-o. La prononcado de ambaŭ parolintoj, precipe tiu de la virino, estis belega. Ĝi vere refutas la asertojn de la malamikoj de Esp-o, ke ĝi ne povas atingi unuecan prononcadon kaj restas ĉiam sub la influo de unu aŭ alia nacilingvo. En Sofio la aŭdebleco de la elsendo per la mallongaj ondoj, precipe per 41m, estis tre bona.

La redakcio de „Bulgara Esperantisto“ esprimas la kontenton de la bulgara esp-istaro pri tiu ĉi unua programo de Radio Moskvo, kiu estas grava evento en la nuntempa E-movado en la mondo. Ni gratulas tutkore la administracion de Radio Moskvo kaj la iniciatintojn kaj organizintojn de la elsendo, esperante, ke ni havos la plezuron aŭskulti ankaŭ aliajn Esperantlingvajn programojn de Radio Moskvo kaj se eble — regulajn elsendojn en Esperanto.

D. Haĝiev

100-JARIĜO DE LA BULGARA LIBERO

CELEBROJ DE LA 100-JARA JUBILEO

Ĉiuloke en la lando la esp-istoj organizis solenajn celebroy de la 100-jariĝo de la bulgara libero.

Sofio. Tuturba solenaĵo okazis en salono de la kulturdomo sur placo „Vâzrajdane“. Prelegon pri la Liberiĝo faris Nenko Jonkov. La riĉan belartan programon partoprenis kanthoro, gvidata de nia s-ano Mihail Karamihajlov, la konataj E-kantistoj Marija Angelova kaj Veselin Damjanov, artistoj el muzikteatro „St. Makedonski“ kaj el la Teatro de la Popola Armeo.

Kazanlâk. En la celebra kunveno, organizita de E-societo „Roza Valo“, raporton faris ing. Ivanka Genkova. La poemon

„La volontuloj ĉe Sipka“ de I. Vazov recitis en Esp-o Dimitro Nikolov. Doĉka Dolapĉieva plenumis, ankaŭ en Esp-o, kanton de la rusaj soldatoj, ŝatatan de ili dum la tagoj de la Liberiga Milito.

CELEBRO ANKAŬ EN MOSKVO

La 26-an de februaro en Moskvo okazis solena kunveno de la esp-istoj el Moskvo dediĉe al la 100-jara jubileo de la bulgara liberiĝo el otomana jugo. Priokazan paroladon faris k-do S. Krajnov — vicprezidanto de la Moskva Internacia E-Klubo. La ĉeestantoj aprobis gratulelegramon al la bulgara esperantistaro.



rumanoj

En la Liberiga Rusa—Turka Milito (1877—78) partoprenis ankaŭ la amika rumana popolo. Sub la standardoj batalis ĉ. 64 000 ĝiaj filoj.

La rumanaj trupoj partoprenis la trian atakon de Pleven (11 de septembro 1877). Aparte grandan heroecon ili montris ĉe la atako de la redutoj apud v. Grivica (proksime de Pleven), kie pereis kiel bravuloj majoro Ŝoncu, kapitano Maraĉinjanu ka. Batalante ŝultron ĉe ŝultro kun la rusaj trupoj, ili sin ĵetis kontraŭ reduton n-ro 1 kaj okupis ĝin post sangoverŝa bajoneta batalo.

La rumanoj partoprenis ankaŭ la sieĝon de Pleven-fortikaĵo, organizitan de gen. Totleben. Ĉe la provo de Osman paŝao trarompigi la blokadan ringon je la deka de decembro 1877, finiĝinta per kapitulaco de la osmana armeo, ili disbatis la kontraŭstarantan malamikan grupigon.

Denove la rumanaj trupoj manifestis abnegacian heroecon ĉe la atako kontraŭ la fortikaĵoj apud vilaĝoj Smârdan kaj Ivanovo survoje al la fortikaĵo de Vidin.

finnoj

Kune kun la rusaj soldatoj ankaŭ filoj de la finna popolo verŝis sangon por la liberigo de Bulgario el osmana jugo. La Lejbgvardia* Finna Regimento ricevis sian batalbaptigon dum la atako apud v. Dolni Dâbnik je la 24 de oktobro 1877. Sultron ĉe ŝultro kun la soldatoj de la Lejbgvardia Regimento Pavlovskij la finnoj penetris en la Grandan Reduton kaj en bajoneta batalo faligis ĝiajn defendantojn.

La finnaj soldatoj batalis bruston kontraŭ brusto ankaŭ apud v. Pravec, proksime de Orhanie (nun Botevgrad). Ili estis en la centra atakanta kolono, kiu per bajoneta frapo igis la malamikon forkuri.

Kune kun la unuaj rusaj trupoj la Lejbgvardia Finna Regimento eniris Sofion je la 4 de januaro 1878. Poste ĝi partoprenis la batalon apud Plovdiv (15—17 de januaro), en kiu la armeo de Sjulejman paŝao estis disbatita. Jen kion skribis la rusa militkorespondanto L. V. Sahovskij pri la heroeco de la finnoj en tiu batalo: „Laŭ la ordono la Finna Regimento eniris la riveron (Marica), kiu rapide portis pecojn de neĝo kaj glacio. La frosta vento tranĉis vizaĝojn kaj manojn, la akvo atingis ĝis la zonoj de la soldatoj. Levinte fusilojn super la kapoj ili kun granda malfacileco trairis la riveron baraktante kontraŭ la forta fluo. Atinginte la transan bordon, kvankam tute

frostiĝintaj, ili kure sin ĵetis antaŭen, dum la movado ŝargante la fusilojn kaj pafante.

poloj

En la Liberiga Milito enkadre de la rusa armeo partoprenis ankaŭ polaj soldatoj kaj oficiroj. Kapitano G. J. Jakubovski kaj leŭtenanto L. I. Voĵĉehovski komandis rotojn de bulgaraj volontuloj.

Pro manifestitaj batalaj kaj komandaj kvalitoj en la batalo apud Stara Zagora je la 31 julio 1877 leŭtenanto L. I. Voĵĉehovski estis honorita per ordeno „Sankta Ana“.

Por la bulgara libero verŝis sian sangon la leŭtenantoj Voĵĉehovski kaj Boleslavski, la kapitanoj Jakubovski kaj Propki, vickolonelo Manceviĉ ka., ankaŭ la kuracistoj Boguslavski, Zakŝevski, Leŝĉinski, Lubenski, Ĉervinski ka.

Post la Liberigo en Bulgarion venis polaj instruistoj, kuracistoj, inĝenieroj, pentristoj kaj muzikistoj por helpi la bulgaran popolon ĉe la konstruado de propraj ŝtato kaj kulturaj institutoj.

hungaroj

La granda hungara popola poeto Janoŝ Aran verkis la versaĵon „Pleven“, dediĉitan al la epopeaj bataloj apud tiu urbo. Multaj hungaraj ĵurnaloj aperigis artikolojn, informojn kaj ilustraĵojn, kiuj rakontis pri la heroismo kaj oferpreteco de la rusaj soldatoj kaj la bulgaraj volontuloj.

En la Liberiga Milito partoprenis ankaŭ hungaraj volontuloj — kuracistoj ka., kiuj venis helpe al la bulgara popolo inspiritaj de plej noblaj motivoj.

La eminenta hungara sciencisto Feliks Kanic dediĉis multan lokon al la milito en la dua eldono de sia trivoluma verko „Danuba Bulgario kaj Balkano“, aperinta en 1880—1882 germanlingve. Li donis preskaŭ plenan bildon de la milito, substrekante ĝian liberigan karakteron.

ĉeĥoj kaj slovakoj

Post la kapitulaco de Pleven la laboristoj el la fabrikoj kaj uzinoj de Prago kaj la progresema junularo organizis imponan manifestacion, dum kiu ili starigis sloganojn subtene al la bulgara popolo kaj pri la liberiga misio de la rusa armeo. Manifestacioj okazis ankaŭ en Pilzen, Ostrava kaj Banska Bistrica (Slovakio). En Ĉeĥio kaj Slovakio oni kolektis libervolan monhelpon por la bulgaroj, kiuj jam dum la Aprila Ribelo (1876) estis gajnintaj la estimon de la ĉeĥa socio.

*Lejbgvardia — imperiestra, reĝgvardia.

La ĉeĥaj verkistoj Jan Neruda, Karolina Svetla, Svatopluk Čech, Eliška Krasnohorská, Jozef Sladek, Jaroslav Vrahlicki ka, same la slovaka poeto Pavel Hviezdoslav en vico da verkoj esprimis noblajn fra-tajn sentojn al la bulgaroj lige kun la Libe-riga Milito.

Multaj estis la ĉeĥoj, kiuj post la liberigo de Bulgario eklaboris por la formado de ĝiaj

kulturaj institutoj. La eminenta historiisto Konstantin Ireček pasigis kvin jarojn en Bulgario kiel ĉefsekretario de la Ministerio de Popola Klerigo, ministro de la sama ministerio, direktoro de la Nacia Biblioteko ka. La talentaj ĉeĥaj penstristoj Ivan Mārkvicka (Jan Vaclav) kaj Jaroslav Vešin ankaŭ ligis siajn vivon kaj verkaron kun la sorto de la bulgara popolo.

11 de aprilo — Internacia tago de la Eksaj Politikaj Malliberuloj kaj Koncentrejanoj

Prodan Protlanov

ESTINGITA FAJRO

Estis varmega somera tago, kiam oni punsendis min al koncentrejo apud danuba vilaĝo. Tie oni konstrua-dis digon. La reĝimo en la koncen-trejo estis severa kaj senkompata. Unuvorte — kruela. Ni, la punitoj, ellitiĝis frue antaŭ sunleviĝo kaj iris por fosi grundon. La elfositan grun-don oni transportis per puŝĉaretoj kaj amasigis ĝin. Tiu labormaniero estis tre primitiva kaj peza. La normo — ege alta. Ofte por plenumi ĝin ni devis fosi tutan nokton. . . Tio el-ĉerpis niajn fortojn. Kiel krono de ĉiuj suferoj nin atakis kuloj kaj en la dormejo — aliaj parazitoj. Niaj kor-poj estis kovritaj de gratvundoj. Ĉiu el ni revis trankvilan dormadon kaj bongustan manĝaĵon. Ĉar la kaĉoj kaj la supoj, kiujn oni donis al ni, estis io abomena, nepriskribebla.

Nian labortrupon oni nomis „La Nigra Bataliono“. Kaj niaj nigraj tagoj kvazaŭ ne havis finon. . . Nin kontrolis kaj zorge gardis ĝendarmoj. La ĝendarmoj en la koncentrejo estis specialaj homoj. Oni varbis ilin el inter la plej kruelaj kaj plej koruptaj. Tio estis homoj kun sadismaj instink-toj, homoj sen skrupulo kaj sen kon-scienco. . .

Malsataj kaj magraj, ni laboris ĝis plena konsumiĝo de la fortoj. Sed la plej magra el ĉiuj estis baj* Dragan, vi-laĝano el nordbulgara regiono. Pro la varmego ni ĉiuj laboris ĝiszone nudaj.

* Baj — adresvorto al pli aĝa viro en Bulgario.

Baj Dragan, viromezaĝa, prezentis de si mem „sakon da ostoj“. Sub lia haŭto la ripoj reliefigis kiel klavaro de forte-piano. Li similis vivan rentgenan ski-zon. Neniu kapablis diveni, de kie li ĉerpas fortojn. Li laboris ĝis nokto-mezo kaj ellitiĝis kiel ni ĉiuj, fruma-tene. Lia ŝatata konversacia temo estis „la vilaĝa kuirarto“. Kial li estis punita, neniu sciis. Li mem ankaŭ. Oni tak-sis lin politika krimulo. Politikon tamen li ne komprenis. En lia kapo estis kaoso de neklaraj ideoj. Vere, niaj klopodoj klerigi lin politike ne estis tute senfruktaj. Sed tiu procedo efektiviĝis tre malrapide kaj ni, liaj instruantoj, tro rapidis. . .

Baj Dragan estis la favorato de la politikaj kondamnitoj. Pro lia malgrasa kaj maldika figuro oni nomis lin „Gandi“. Vere ekzistis ia simileco in-ter li kaj la fama hinda ideologo de la pasiva rezistado Mahatma Gandhi. Baj Dragan estis tre kontenta pri sia krom-nomo.

Nia perimetro estis rigore limi-gita. Ni rajtis marŝi en definitiva te-ritorio: la nigra vojo apud la her-bejoj, la marĉo, la telegrafaj fosto- kaj la salikejo apud Danubo. Ekster tiuj limoj nin atendis morto. La plej danĝera por ni loko estis la salikejo. Neniu rajtis, nek kuraĝis eniri ĝin. Post la salikoj troviĝis la deponejo por la eksplodigaj materialoj, kiujn oni intence ne disponigis al ni. Tio faciligus nian laboron kaj ŝparus al ni multajn turmentojn. Guste tion



tamen la ĝendarma komandanto ne deziris.

Tiun komandanton oni neniam vidis sopra. Lia rezidejo estis la vilaĝa drinkejo, kie li, inspirita de alkoholo, klarigadis al iuj senlaboruloj la internacian situacion. . .

Lia helpanto tamen, la ĝendarma ĉefserĝento, estis ĉiam sopra. Svelta kaj eleganta, eĉ bela, tiu uniforma dando razis sin dufoje ĉiutage. Li eligis odoron de malmultekosta parfumo kaj liaj botoj ĉiam brilis. Ĉevalon li ne rajdis, sed liaj botoj estis ornamitaj per tintantaj spronoj. Tiu sprona tintado. . . Ĝi frostigis nian sangon! Aŭdante la spronojn, ni sciis, ke la ĝendarmo estas obsedita de iu kruela ideo pri turmentado de la kondamnitaj. Li estis ĉiam preta al sadismaj ekstremoj kaj dum la turmentado rikanis apenaŭ rimarkeble. Mi intence evitas priskribi la aĉaĵojn de tiu animkripla belulo. . .

Iun tagon oni devigis nin labori apud la salikejo. Nia kamarado, baj Dragan, subite iĝis neordinare bonhumora. Li plivigliĝis kaj eklaboris tiel energie, kvazaŭ en sia propra entrepreno. De tempo al tempo li kuris al la salikoj kaj kolektis sekajn branĉetojn. Li metis ilin unu sur alian kaj helpe de du ŝtonoj faris improvizitan fajrujon por kuirado. Tiun tagon, kvazaŭ laŭmende, la ĝendarma kontrolo estis malaktiva. Nin gardis la plej dormema kaj stultmiena ĝendarmo.

Jen baj Dragan metis akvoplenan ladskatolon sur la fajrujon kaj bruligis la branĉetojn. Li plukis ion kaj ĵetis ĝin en la skatolon. Poste denove kuris al la laborobjekto. . . Tio ofte ripetigis.

— Kion vi kuiras, Gandi? — ni demandis lin ŝerce.

— Mi infuzas drogon! — li respondis laŭ la sama maniero.

— Ĉu vi malsanas?

— Mia sano estas pli firma ol la fortikaĵo de Vidin!

— Tiam?

— La drogo purigos mian sangon kaj mi iĝos pli dika!

Tagmeze baj Dragan iris al sia fajrujo kaj daŭrigis la ŝirkolektadon de sia „drogo“. Sed li tiel enprofundiĝis en sia okupo, ke nerimarkinte eniris duonon de metro en la tabuitan teritorion. . .

En tiu momento kvazaŭ el la tero aperis la ĝendarma ĉefserĝento. Vidante lin, ni ĉiuj ektremis. . . Jam estis malfrue por baj Dragan korekti sian eraron. Li tuj premis manplatojn kiel por preĝo kaj humile petis pardonon. . . Ve! La serĝento estis senkompata. En lia mano ekbrilis revolvero. La ĝendarmo direktis ĝin al la koro de la malfeliĉulo. Sekvis pafo. Baj Dragan falis teren. . . Neniu kredis siajn okulojn. La murdisto venis al ni per trankvila irmaniero, kvazaŭ nenio estis okazinta, kaj ordonis: „Laboru!“

Mutaj pro konsterniĝo kaj timo ni klinis la kapojn. . . La serĝento iris al nia gardanto kaj kolere akuzis lin, ke li dormas kaj ne plenumas akurate siajn oficajn devojn. Li adresis al sia ŝubulo vulgarajn insultojn kaj svingis manon por hati lin. Sed la stultmiena ĝendarmo saltis malantaŭen, ŝargis la karabenon kaj kriis:

— For de mi! Kiam mi postenas, neniu rajtas tuŝi min!

La serĝento paliĝis, ĉu pro timo, ĉu pro kolero. Sed li cedis kelkajn paŝojn kaj demandis minace:

— Vi direktas pafilon al via estro?

— Iru je la diabloj! Ne estas granda heroaĵo, ke vi mortpafis nearmitan homon!

La serĝento silente forlasis tiun lokon kaj post kelka tempo revenis kune kun la koncentreja komandanto. La du estroj ambaŭ verkis falsan protokolon, ke baj Dragan estas mortpafita ĉe provo forkuri. . . Ili invitis la stultmienen gardanton subskribi ĝin, sed tiu rifuzis kategorie, malgraŭ la minacoj. Kompreneble, post kelkaj tagoj li estis eksoficigita.

Ni daŭrigis nian „egiptan“ laboron. La komandanto kaj lia helpanto, la murdisto, malaperis.

Posttagmeze venis komando, ke ni entombigu la kadavron. Mi estis unu el la volontuloj. „Gandi“ estis entombigita apud la salikoj. Preterpasante

la estingitan fajron mi ne eltenis kaj ĵetis rigardon en la ladskatolon: en ĝi estis peco el porkleda mokaseno kaj kelkaj tigoj da urtiko. . .

La kompatinda baj Dragan! Li provis kuiri supon kaj por tiu provo pagis per sia vivo.

PENTRAĴEKSPOZICIO DE D. HAĜIEV

Ni malkovras nin. Unu la alian. Senĉese. Kvankam konatoj, amikoj jam de pluraj jaroj. Longan tempon ni vivas kun iu homo kaj en unu momento ni povas esti eĉ surprizitaj — ni malkovras en li ĝis nun nekonaĵon, eĉ nesupozeblan trajton aŭ kapablon.

Por mi tia surprizo estas nia elstara espektanto Dimitro Haĝiev.

La sindikata komitato ĉe Ministerio de Eksterlandaj Aferoj, kie Haĝiev oficas, aranĝis memstaran ekspozicion el liaj pentraĵoj. Ĝi estis dediĉita al la 60-jariĝo de la Granda Oktobra Revolucio kaj la 100-jara jubileo de la liberigo de Bulgario.

Plenumante siajn oficajn devojn sinsekve en Ĉeĥoslovakio, Usono, Tanzanio kaj Aŭstralio, kiel diplomato, Dimitro Haĝiev dediĉis parton de sia libera tempo al la pentroarto. Tial en liaj bildoj ni sentas la profundan emocion, naskitan ĉe renkontiĝoj kun la beleco ne nur en nia patrolando, sed ankaŭ en la landoj, kie li pasigis 16 jarojn.

Modesta, kiel multaj amatoroj, Dimitro Haĝiev mem neniam pensis pri ekspozicio. Sed frue-malfrue la vera belarto atingas la homojn.

La kapablo de Haĝiev pentri elmontrigas ne nur en la pejzaĝoj, sed ankaŭ en la portretoj. Li bonege prezentis Lenin, Blagojev, Benkovski, knabon el Tanzanio (sur la foto) portreton de sia filo ka. Kelkaj grafikaĵoj kaj skizoj de unu „săbotnik“ prezentas ankaŭ tre favore la aŭtoron. Haĝiev pentras ekde sia infaneco. Kun granda intereso li rigardis la pentroarton de sia patro, kiu per karbo pentris sur cementajn sakojn portretojn de siaj kamaradoj-laboristoj. Lia frato ankaŭ pentras, kaj partopreninte amatoran belartan ekspozicion en Komi (USSR) estas premiita.

Ofte sukcesaj amatoraj ekspozicioj vekas pensojn pri diferenco kaj simileco inter kreaĵoj de la majstroj-profesiuloj kaj la amatoroj, pri la harmonia disvolviĝo de la persono en la estonteco, pri la aserto, ke la talentaj homoj estas pli multaj ol tiuj, kiuj manifestiĝas en la vivo. „Ĉiu homo estas talenta“ — diras akad. Gurij Marĉuk. Kompreneble, la grado de talenteco estas diversa. Granda rolo por manifestiĝo de ĉiuj talentoj ludas la kondiĉoj, kiuj favoras aŭ malhelpas la disvolviĝon de la talento. Feliĉe D. Haĝiev vivas en socio, kiu ebligas la flordon de ĉiu talento.

Dimitro Denĉev

săbotnik — libervola laborbrigado, okazanta plej ofte sabate.



Nia s-ano prof. d-ro STOJAN ĜUĜEV, membro de la Akademio de Esp-o, ricevis altan distingon — la premion J. G. Herder por 1978, pro meritoj kaj atingoj en la folkloro scienco kaj etnomuzikologio. Ĝuĝev estas multjara instruisto en la Bulgara ŝtata Konservatorio kaj aŭtoro de multaj sciencaj verkoj.

La premion aljuĝas internacia komitato (kuratorio) kun aprobo de la Akademia Konsilantaro de la Viena Universitato.

Gratulon al nia eminenta samidiano!



Inter la nomoj de la plej kuraĝaj marnavigistoj en la mondo viciĝis nova nomo — de kapitano Georgi Georgiev el u. Varno, Bulgario. Tiu brava homo sukcesis ĉirkaŭiri la terglobon per sia malgranda jahto „Kor Karoli“ por 210 tagoj — do per 17 tagoj malpli ol Francis Ĉiĉester (Francis Chichester), kiu atingis sian sukceson sur la ferdeko de „Gipsi Mof“ (Gipsy Moth) — jahto malpli eta kaj multe pli bone ekipita. Tiel kapitano Georgiev starigis novan mondrekordon. Ĝis li neniu marnavigisto sukcesis tranavigi sola tiun vojon por tiom da tempo.

En 1976 kapitano Georgiev partoprenis en la transatlantika regato* „Ostar 76“, kie li okupis la 37-an lokon inter la 79 sukcesintoj. Tiam li estis distingita per la honora signo „Ostar 76“ — simbolo de vireco, de morala kaj fizika eltenemo.

Tuj post tiu ĉi konkurado, sen kia ajn ripozo, la brava kapitano direktiĝis al ĉirkaŭmonda vojaĝo. Tiu decido ne estis esprimo de vanta ambicio pri sensacio aŭ aventuroj. Ĝi naskiĝis el la profunda konvinko, ke jam venis la tempo ankaŭ por la bulgaraj maristoj montri sian rajton aparteni al la granda tutmonda marista familio.

Inspirata de tiu konvinko Georgiev direktiĝis en la danĝera veturado. Lia kredo je la fina sukceso estis forta. Al sia familio li skribis: „Mi fartas bone. Ne maltrankviliĝu. Mi esperas, ke ĉio finiĝos bone. Mi rapidos pli multe, ol en „Ostar 76“ por reveni pli baldaŭ al vi, hejmen, en Bulgariion.“

Multajn monatojn kapitano Georgiev estis ĉirkaŭita nur de ondoj kaj ŝtormoj. Malfacilaĵoj kaj riskoj akompanis tagnokte lian batalon kun la akvoelemento. Ekzemple en la regiono de la insuloj Samoa kaj Fiĝi li kelkajn tagojn suferis pro neĉesanta tropika pluvego kaj rigora vintro. Estis okazo, kiam li kvarfoje vane provis trapasi iun regionon kaj apenaŭ la kvinan fojon sukcesis fari tion.

La transiron de la Hinda Oceano kapitano Georgiev faris por rekorde mallonga tempo — 54 tagoj. Tion li atingis dank' al sia kuraĝa decido elekti kurson al sudo, al latitudoj kun pli oftaj kaj fortaj favoraj ventoj. Tiel efektiviĝis unika trapaso de la Hinda Oceano dum vintra sezono per malgranda jahto. Apud la afrikaj bordoj „Kor Karoli“ troviĝis en neordinare malbona vetero sub la batoj de la ondoj nomitaj „ondoj-mortigantoj“. Ekestis kritikaj momentoj, en kiuj denove venkis la eksterordinara vireco kaj naviga majstreco de la maristo.

* Regato — naviga konkurado.



Maristajn salutojn al la legantoj de «Bulgara Esperantisto», batalantoj por paco kaj amikeco sur nia planedo!

Kap. Georgiev

Varno,
19 de marto 78

Kiam poste, jam en la patrolando, kapitano Georgiev rakontis pri sia malfacila vojaĝo, li aldonis ankoraŭ: „Tian navigadon povas fari nur homo, kiu kutimiĝis labori.“ Per tiuj vortoj li ne volis elstarigi sin, sed sugesti bazan postulon por sukceso al ĉiuj siaj posteuloj.

Komencante sian vojaĝon Georgi Georgiev estis kapitano de proksima navigado. Nun jam li estas kapitano de malproksima navigado, honorita de la popola registaro per la plej alta titolo — „Heroo de Popola Respubliko Bulgario“.

Ni, la bulgaraj esperantistoj, kune kun nia tuta popolo, bondeziras al la glora kapitano Georgiev firman sanon kaj favoran venton ĉe liaj estontaj navigadoj.

En la somero de la kuranta jaro, kiam Varnon vizitos miloj da esperantistoj por partopreni la 63-an UK de Esperanto, ili havos eblecon viziti ankaŭ la jahtklubon, vidi la jahton „Kor Karoli“, konatiĝi kun la brava kapitano Georgiev kaj lia marista familio.

Lili Andreeva

LA PRABULGARA KULTURO

La problemoj pri la kulturo de la prabulgaroj en la plej frua periodo de la fondo de la bulgara ŝtato (681 j.) sur la Balkana Duoninsulo ofte estis prezentita en neĝusta lumo. La arkeologiaj donitaĵoj el tiu epoko refutas la tendencajn informojn pri sovaĝa, barbara, nomada popolo, kiel estis karakterizataj la prabulgaroj. Vere, forlasinte sian prapatrujon en Azio ili vivis nomadmaniere kun provizoraj restadoj en la plej orientaj eŭropaj teritorioj. Movigante okcidenten ili ne lasis daŭrajn arkitekturajn monumentojn. Sed en malnova siria kroniko de 555 j. oni mencias, ke la bulgaroj havis konstruitajn urbojn antaŭ ol forlasi la bordojn de Azova kaj Kaspia Maroj.

Laŭ la malnovaj kronikoj la bulgara ĥano Ispereh, okupinte la regionojn apud Istrum (Danubo), translokis sian „aŭlon“* apud Pliska, kie liaj heredantoj konstruis fortikigitan ĉefurbon en la loko „Aboba“. Guste la Aboba-palacoj estas la nuraj atestantoj, ke la bulgaroj havis sian originalan kulturon.

Senduba fakto estas, ke la prabulgaroj okupis teritoriojn kun riĉa antikva traco, romia kaj bizanca kulturo. Sed ili jam havis sian originalan kulturon. Tion pravas la fakto, ke ili ne akceptis tuj la trovitajn tradiciojn de konstruado. Tipa por la romia konstruado estis la masonaĵo el bakitaj brikoj kaj dispecigita ŝtono aŭ nur el bakitaj brikoj, kiel estis dum tiu epoko de bizancismo. La unuaj bulgaraj palacoj en Aboba estas konstruitaj el ŝtonaj blokoj. Tio montras, ke la prabulgaroj havis konstrusperton jam en sia prapatrujo, kiu speguliĝis en la monumenteca konstruado de la palacoj.

La arkitekturo de la palacoj en Aboba parencas kun la Oriento. Ĝiaj originaj fontoj estas en la persa-sasanida arkitekturo.

La nomada vivmaniero de la prabulgaroj ne ekskluzivas la ekziston de materiala kulturo. Ĉu la trovita en Hungario trezoro de Atilo, produkto de alta kultura nivelo, ne estas heredita de la nomadaj hordoj?

Do la prabulgaroj venis sur la Balkanan Duoninsulon kun sia intensa nacia vivo-kapablo, kiu donis sian spiriton, sian solidan ŝtatorganizon al la trovitaj ĉi tie slavoj, kies spirita maturiĝo estis jam komenĝinta.

Pri la prabulgara kulturo parolas ankaŭ aliaj urbokonstruaj kaj arkitekturaj donitaĵoj. Ekzemple la aplikita en Aboba—Pliska sistemo de urboplanado kaj fortikigado tute diferencas de la trovita ĉi tie romia-bizanca urbokonstrua sistemo. La

romiaj urboj karakteriziĝas per rektlinia strata reto, per spino de du ĉefaj stratoj, kiuj kruciĝas en centra forumo. La fortikaĵmuroj ĉirkaŭbaris nur malgrandan spacon.

La unua bulgara ĉefurbo havas tute alian strukturon, konsistantan el du koncentraj fortikaĵoj — unu en la alia. La ekstera fortikaĵo de Pliska ĉirkaŭbaris spacon de 23 klm² kun fosaĵoj kaj remparoj. La interna fortikaĵo havis la formon de trapezo kun mezuroj 612/788/740 m. Ĝi estis farita en la tempo de ĥano Omurtag kun muroj dikaj 2.60 m. kaj altaj 10 m, masonitaj el ŝtonblokoj. La supra rando finiĝis per dentoformaj elstaraĵoj kaj embrazuroj. Ĉe la anguloj de la fortikaĵo staris rondaj turoj. La portikoj estis ornamitaj per reliefo kaj plastaj figuroj de leonoj, subtenantaj kolonojn.

La granda palaco de Aboba, konstruita el egaj ŝtonblokoj, parolas pri epoko kun severa moraleco. La restaĵoj de akvujoj, banejoj, kultokonstruaĵoj, speciala hejtsistemo ka. atestas pri alta kulturo de la vivmaniero, pri kultura nivelo nekaraktiza por la sovaĝaj paganaj gentoj.

Krom la arkitekturaj signoj, pri la kulturo de la prabulgaroj estas postsignoj ankaŭ de evoluantaj tiutempe dekoraciaj artoj — fragmentoj de pentrita ceramiko, platoj kun pentraĵoj kaj aliaj ornammotivoj; la reliefo kaj la skulptaĵoj ankaŭ parolas pri la rilato de la bulgara nacio al pli supraj sferoj de la artoj.

La arkeologiaj postsignoj el la unua bulgara ĉefurbo parolas pri la arkitektura kadro, en kiu pasis la antaŭkristana periodo de la vivo de la bulgara ŝtato. Se ne ekzistis la kultura bazo de tiu frua periodo, oni ne povus atingi la apogeon de la Ora Jarcento de la bulgara kulturo en la komenco de la X jc.

Lila Zaharieva

LA REZULTOJ DE KONKURSO DE IREN

La Organiza Komitato de la 10-a Internacia Renkontiĝo de Esperantistoj-Naturamikoj anoncis konkurson inter la partoprenintoj en IREN je la temo „Miaj impresoj pri la distrikto Baranja kaj pri IREN“. Alvenis konkursaĵoj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Jugoslavio kaj Hungario.

La ĵurio donis la I-an premion — partoprenkotizon por la 11-a aŭ 12-a IREN — al inĝ. Stefan N. Georgiev — u. Sumen, Bulgario, kaj Linhart Riznar — Svitavi, ĈSR. Libropremiojn gajnis: Branka Leontiĉ kaj Cvetanka Tubiĉ el Jugoslavio, kaj Volker Schlisser el GDR.

Ni gratulas la premiitojn!

* *Aulo* — loĝloko, loĝrestadejo el transporteblaj loĝejoj en Meza Azio.



Kiam oni parolas pri famuloj, kiuj, antaŭ la naskiĝo de Esperanto kaj eĉ de Volapuko, interesiĝis aŭ aludis pri la problemo de komuna lingvo, oni pensas pri Dekar (Descartes), Volter (Voltaire), Lajbnic (Leibnitz) kaj multaj aliaj, sed neniam estas citita la nomo de Jul Vern (Jules Verne).



Jam en 1870, en sia romano „Dudek mil mejlojn sub la maroj“, Jul Vern imagis frazon el mistera lingvo, kiun kapitano Nemo uzadis kun siaj samsortaj kunuloj: „Nautron respoc lorni virch“, pri kies signifo ni ne scias, sed kiu estis, laŭ informo de l'aŭtoro: „lingvo belsona, harmonia, fleksebla“.

En unu el siaj lastaj verkoj — „La eterna Adamo“, la verkisto uzas esprimojn kaj frazon de la lingvo „kiu estos parolata de niaj malproksimaj posteuloj en Atlantido subite malmergiĝinta el Atlantiko“.

Aliaj ekzemploj ne mankas en la verkaro de Jul Vern kaj se tiujn frazojn kaj esprimojn li elpensis nur por siaj imagitaj rakontoj estas tamen certe, ke la lingva problemo de liaj samtempuloj ankaŭ interesis lin.

Li naskiĝis en Nant (Nantes) en 1828, edziĝis al Amiens-a vidvino en 1857 kaj iom post la milito de 1870 la paro definitive instaligis en Amiens. Jul Vern baldaŭ fariĝis urba konsiliano, amikiĝis kun la elito de la urbo kaj fariĝis la animo de beletraj, artistaj kaj bonfaraj societoj.

Intime ligita kun juna kaj elokventa deputito, Raul Djuval, fanatika partiano de la antaŭ nelonge naskita Volapuko, la du amikoj ofte parolis pri tiu unua vere funk-

cianta artefarita lingvo.

La Volapuka pajlofajro ne lasis amarsenton ĉe Jul Vern, malgraŭ ke jam delonge li konvinkiĝis, ke nur artefarita lingvo solvos la internacian lingvan problemon.

Komence de 1903, sekve de parolado de Teofil Kar (Théophile Cart), Esperanto enplantiĝis en Amiens kaj tuj naskiĝis grupo, kies unua prezidanto estis Sarl Tassenkur (Charles Tassencourt), negocisto, konsula agento de Usono kaj amiko de Jul Vern. Tassenkur kaj Jozef Delfur, cenzoro de la liceo kaj kunfondinto de la grupo, tuj vizitis Jul Vern por peti, ke li akceptu la honoran prezidantecon de la grupo. Jul Vern entuziasme akceptis tiun proponon, kaj promesis, ke en baldaŭa verko li priskribos la meritojn de Esperanto. Jam la februara numero (1903) de la centra organo „Lingvo Internacia“, redaktata de Amiens-devena esperantisto, Pol Fruitie, anoncis la naskiĝon de la nova grupo, honore prezidata de Jul Vern.

En la unuaj eldonoj de la „Tutmonda Jarlibro Esperantista“, redaktitaj de barono Felisien djo Menil kaj eldonitaj de Haŝet (Hachette), troveblas la nomo kaj adreso de Jul Vern, ano de la grupo de Amiens.

Sian promeson al Tassenkur kaj J. Delfur, Jul Vern plenumis verkante novan romanon, kiun li nomis „Studvojaĝo“: unu el ĝiaj herooj estis iu Nikola Vanof, pasia esperantisto. Sed Jul Vern tro frue mortis, la 24-an de marto 1905, kaj ne povis finverki la Esperantan romanon.

Ĉe lia tombo Gustav Kest (Gustave Queste) en la nomo de la esperantistoj adiaŭis la honoran prezidanton. Lia parolado finiĝis jene: „Jul Vern skribis foje: ĉio granda, kion oni faris en la mondo, estas farita je la nomo de tro grandigitaj esperoj. Tio estas ankaŭ nia devizo, kaj ŝajnas, ke el la mistera eterneco, transformita, lia granda animo ankoraŭ sekvas la progresojn de la esperantistoj, kiuj, laŭ la vortoj de sia majstro, d-ro Zamenhof, marŝas al la paca akiro de la tero sub la sankta standardo de l'espero.“

La lasta manuskripto de Jul Vern, kara al la esperantistoj, restis nepublikigita. Miŝel Vern, filo de la verkisto, ĝin reprenis kaj utiligis por verki la unuan parton de sia romano „La stranga aventuro de la misio Barsak“, sed en tiu ĉi verko ne plu troveblas aludoj pri Esperanto.

Respektaj de la lastaj konvinkoj pri Esperanto de la renoma verkisto de la Universo ni prezentas sur tiu ĉi paĝo foton, kiu estas vera mesaĝo: fiere kaj fidoplene al la estonto, la mano sur libro ornamita de a esperantista emblemo.

Kunlabore verkis: M. Delkur, J. Amuru (El «Franca Esperantisto», n-ro 307/1977)

Invitite de Helena Esperanto-Asocio Atenon vizitis la sekretario de BEA Kunčo Vălev — lektoro de Esperanto en la Sofia Universitato „Kliment Ŭhridski“. Li gvidis mallongan metodikan kurson de Esp-o kun la celo kontribui por plibonigo de la instru-laboro de HEA. La kurson vizitis ĉ. 30 esp-istoj de diversaj aĝoj kaj profesioj.

Dum la tuta tempo de sia restado en Ateno kaj poste en Tesaloniki K. Vălev estis ĉirkaŭita de grandaj sincereco, helpemo kaj amikeco flanke de la grekaj samideanoj. La kurso kaj liaj novaj konatiĝoj en Grekujo estas nova reala paŝo al plivastigo de la tradicia amikeco inter la bulgaraj kaj grekaj esp-istoj, al kreo de pli efika kunlaboro inter BEA kaj HEA en la spirito de amikeco kaj kunlaboro inter niaj najbaraj landoj.

E-PROGRAMOJ DE LA TELEVIDO EN ROSTOV

La varia agado de la E-klubo en Rostov na Donu (USSR) vekis interesigon ĉe la loka televidstacio. Jam dufoje (en decembro 1977 kaj januaro ĉ. j.) ĝi faris 15-minutajn priesperantajn elsendojn. La programo de la dua konsistis el: informoj pri la agado de la E-klubo, momentoj el leciono de Esp-o en kurso, E-versaĵoj kaj kantoj en Esp-o. La elsendoj trovis bonan reeĥon kaj la estraro de la televidstacio intencas daŭrigi ilin.

LINGVAJ PROBLEMOJ EN UNUIGINTAJ NACIOJ

La organizaĵoj de Unuiĝintaj Nacioj elspezas milionojn da dolaroj ĉiujare por lingvaj servoj. Lastatempe eldonita UN-raporto kalkulas, ke en 1976 la organizaĵoj en UN-sistemo same elspezis 105 297 000 US dolarojn por konstantaj kaj laŭbezona lingvaj servoj, kio ne inkluzivas nerektajn kostojn kiel oficejojn, ekipaĵon, presadon ktp. Unu el la pli malgrandaj organizaĵoj taksis, ke, se ĝi uzus nur unu laboran lingvon anstataŭ kvin, ĝia totala buĝeto estus nur 30 ĝis 40% de la nuna.

Kiu pagas la lingvajn servojn en la UN-sistemo? Plejparte la rimedoj disponiĝas el la ordinara buĝeto de la organizaĵoj, kvankam iam tiujn servojn finansas koncernaj registaroj. Tio kutime okazas rilate la germanan lingvon, kaj la araboj financis la unuajn tri jarojn de la efektivigo de la Rezolucio 3190, kiu oficialigis la araban en 1973.

La problemoj tamen estas ne nur financaj. Ekzistas grava manko de interpretistoj kapablaj traduki el la araba aŭ la ĉina en aliajn

lingvojn, precipe en la hispanan aŭ rusan. Oni kutime devas interpreti en tiujn lingvojn „tra“ la angla aŭ la franca, kun sekva multobliĝo de eraroj kaj miskomprenoj.

La konkludoj de la raporto estas iom pesimistaj, kaj plej verŝajne la situacio plimalboniĝos. La rekomendoj temas pliparte pri manieroj regi la problemojn, ol pri manieroj trovi veran solvon. La verkintoj de la raporto proponas, ke la organizaĵoj klopodu limigi la produktadon de dokumentoj kaj rezignu la provon provizi plenajn interpretajn servojn (laŭ la nunaj reguloj, ĉio parolata aŭ skribita interne de UN devas esti tradukita en ĉiujn ses oficialajn lingvojn).

Alia propono estas la starigo de „centra provizejo“ de interpretistoj kaj tradukistoj, sed ĝi estus tre multekosta afero, ĉar la stabanoj, kompreneble, devus ofte vojaĝi. Krome estas malfacile antaŭvidi la bezonojn pro la konstanta ebleco de subitaj ŝanĝoj en la programo de konferencoj.

Malpli kostan kaj pli simplan solvon proponis Ralf Hari, la aŭstralia ambasadoro ĉe UN, parolante al la ĉi-jara kongreso de la Asocio por Internaciaj Studoj en St. Louis, Misuri. Li proponis, ke UN adoptu unu solan interlingvon, kaj prezentis 5-jaran planon por enkonduko de la internacia lingvo Esperanto.

LA UNUIGINTAJ NACIOJ ELDONAS DOKUMENTOJN EN ESPERANTO

La Kabineto de Publikaj Informoj de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj en Nov-Jorko ĵus eldonis en kvina eldono la Esperantan tradukon de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.

La antaŭaj eldonoj estis je la kostoj de UEA ekde 1963.

Tamen ne estas la unua fojo, kiam UNO havas la iniciativon publikigi kelkajn el siaj dokumentoj en la Internacia Lingvo: meze de 1975 estis eldonita la Raporto pri la Internacia Jaro de la Virino, kaj en decembro de la sama jaro — la Deklaracio pri la Koncesio de Sendependeco al la Popoloj kaj al la Koloniaj Landoj.

Ĉar UEA estas en konsultaj rilatoj kun UNESKO, ĝi povas havi peranton ĉe UNO. Celanta al tio, ĝi nomis la ambasadoron Ralf Hari (Ralph Harry) el Aŭstralio, kiu, parolante flue Esperanton, akumulas ankaŭ la komision de ĉefo de la delegacio en sia lando ĉe tiu organo.

El „Revista Portuguesa de Esperanto“
n-ro 22/1977



LA MONSTRO

Ekzistis iam negranda regno kun tre bela kaj fruktodona tero. Meze de ĝi estis longa kaj alta montaro, surkreskita de kverkaj kaj fagaj arbaroj. Suden kaj norden de ĝi serpentumis riveroj. En la suda kaj okcidenta parto de la regno estis aliaj montoj kaj montaroj, kovritaj de belaj larĝfoliaj aŭ koniferaj arbaroj. Kiel gigantaj okuloj rigardis al la ĉiela vasto kristale puraj bluaj lagoj — la okuloj de la montoj.

Kiom estis bela kaj fruktodona la tero de tiu ĉi regno, tiom laborema, brava kaj liberama estis ĝia popolo. Viroj, sveltaj kiel poploj, kun peltĉapoj sur la kapo kaj ruĝaj zonoj ĉe la lumbo, tenis lignajn plugilojn kaj semis la fekundajn ebenaĵojn per tritiko kaj maizo.

Belaj kaj altstaturaj estis ankaŭ la virinoj. En siaj buntaj vestaĵoj, facilmovaj kaj graciaj, ili similis al feinoj.

Miraj estis la festoj de tiu popolo. Dum festotagoj la homoj trinkis mielvinon, ludis per ŝalmoj kaj sakflutoj, kantis bravulajn kantojn pri heroj bataloj kaj arde dancis viglajn dancojn.

Sed pasis forta monstro preter tiu regno. Ekrigardis ĝi al la tero dro-nanta en floraĵo, al la densaj ombroj de l'arbaroj, al la malvarma pura akvo de la fontoj, al la beleco de la virinoj, kaj diris:

— Ĉi tio estos mia tero! Kaj ĉio sur ĝi estos mia!

Ĝi etendis siajn manegojn kaj enigis akrajn ungojn en la korpon de la malgranda liberama popolo. Ekbolis batalo je vivo kaj morto. Ekfluis sangaj riveroj. Fumo de incendioj kovris la ĉielon. Sennombraj viroj, virinoj kaj infanoj falis murtitaj. Sed la monstro estis granda kaj forta kaj ĝi venkis. Nigraj tagoj venis por la

subigita popolo. Melodion de ŝalmo aŭ sakfluto oni povis aŭdi nur profunde en jarcentaj arbaroj, kien la monstro timis iri.

Trankviliĝinta pro sia venko ĝi konstruis palacojn kun specialaj malliberejoj. En ili ĝi kolektis la plej belajn knabinojn de la subigita popolo kaj perforte igis ilin siaj edzinoj. Ĉiun kvinan jaron la monstro deprenis knabetojn, kvin-ĝis okjarajn, de iliaj gepatroj, kaj neniu el ili revenis hejmen. El tiuj knabetoj la monstro faris siajn plej fidelajn korpogardistojn kaj kruelajn soldatojn. Ili forgesis sian genton kaj estis pretaj mortigi eĉ siajn gepatrojn laŭ ordono de la monstro. Tra la urboj kaj vilaĝoj de la sklavigita lando oni aŭskultis nur kantojn de malĝojo kaj sufero, similajn al ploro super tombo.

Multaj bravuloj prenis armilojn kaj provis mortigi la monstron, kelkfoje tutaj regionoj de la regno leviĝis, sed ĉiam sensukcese — la monstro estis tre forta.

Iutage la monstro vidis belegan junulinon kaj decidis fari ŝin sia edzino.

— Atendu, he! Kiu vi estas? Kiu estas via nomo? — demandis ĝi.

— Libero, — respondis la junulino kaj provis foriri.

— Haltu! Tia belulino povas esti nur mia edzino!

— Edzino via mi tute ne deziras esti. Sed se vi, monstro, perfortos min, sciu, ke du bravuloj min liberigos. Kaj ili nepre mortigos vin!

Kun kolerego la monstro enkatenis la aŭdacan junulinon kaj ĵetis ŝin en malliberejon.

— — — — —

En malriĉa vilaĝa dometo de la sklavigita lando naskiĝis knabo, kiun liaj gepatroj bone kaŝis, kaj la sol-

datoj de la monstro ne povis fortreni lin. Kiam la knabo fariĝis plenaĝa, li forlasis sian landon kaj komencis vagi tra la mondo. La juna homo laboris diversajn pezajn laborojn. Multon li vidis kaj travivis, suferis frostojn kaj malsaton, batalis kontraŭ multaj danĝeroj kaj bone hardiĝis. Foje li noktumis apud iu vilaĝo en eksterlando. Frumatene vekis lin fortega tintado de martelo sur ambozo. Evidentiĝis, ke proksime estas forĝejo. La junulo rapide iris al la forĝisto, kiu nomiĝis Ivan. Sed la forĝisto Ivan ne estis kiel la ceteraj homoj. Unu lia lipharo — tuta ŝafelo. Kiam li turnis sian dorson al la suno, venis ombro kiel de nubo. Ankaŭ lia forto estis grandega. Sed plej grava estis tio, ke Ivan havis tre bonan, honestan koron. Li rigardis la junulon, kiu deziris helpi lin, kaj diris:

— Multaj kiel vi venis, sed foriris. Neniu povis helpi min. Nu, prenu la grandan martelon, kaj mi vidos, kiom vi valoras.

Ekeĥis la tuta ĉirkaŭaĵo. El ardigita ŝtalo la junulo faris mirindan glavon.

— Oĥo! — diris ĝoje la forĝisto Ivan. — Jen por mi taŭga helpanto. El vi mi faros bonegan forĝiston.

— Ho ne! — ekĝemis la junulo. — Mi ne deziras fariĝi forĝisto. Mi serĉas bravulon, kiu helpas min liberigi junulinon Libero kaj mian popolon.

Kaj li rakontis pri la monstro, pri junulino Libero, pri la nigra vivo de sia popolo. La junulo ankaŭ rakontis, kiujn landojn li vizitis kaj kie vivas lia popolo. Montriĝis, ke li kaj la forĝisto estas parencoj. Aŭskultis Ivan la rakonton kun plena kun sento kaj fine diris:

— Jes, vi tre pravas! Tian nigran jugon oni ne devas plu toleri. Ni ambaŭ mortigos la monstron!

Li prenis pezan akran sabron kaj ili ekiris kontraŭ la monstron. Kiam la du bravuloj eniris la patrolandon de la junulo, la homoj en urboj kaj vilaĝoj brakumis ilin kiel savintojn.

Ĉie la popolo renkontis ilin laŭ sia kutimo per pano kaj salo. Kaj kun larmoj de senfina ĝojo kaj feliĉo.

Eksciis la monstro pri la du bravuloj kaj ekiris por mortigi ilin. La kunpuŝiĝo okazis norde de la longa montaro, en granda ebenaĵo, ne malproksime de majesta rivero. Vidinte la monstron, Ivan diris al la junulo:

— Vi, frato mia, iru sur la monton kaj gardu la pasejon. Lasu nenium trairi. Mi sola faligos la monstron.

Ekstaris la junulo sur la monto kaj kuraĝe ekgardis. La idoj de la monstro impetis trairi la monton kaj helpi ĝin, sed la junulo ne permesis tion.

Ivan komencis pezan batalon. La monstro enigis siajn ungegojn en lian korpon kaj deŝiris pecojn de karno. Sango ekfluis kiel torento. La batalo daŭris longe. Finfine Ivan kolektis sian tutan forton kaj mansvingis per la peza sabro. Pro tiu frapo la tero skuĝis, kaj la kapo de la monstro ek-ruliĝis forhakita.

Dume jam venis la vintro. Ekestis frostego. Dika neĝo kovris la vojojn kaj trairi la monton fariĝis malfacile. Tamen Ivan ne malesperiĝis. Li ekmarŝis tra frostoj kaj neĝaj tempestoj, subtenata nur de sia juna kunfrato. Ne pasis longa tempo kaj li finvenkis la idaron de la monstro. Falis la katenoj de junulino Libero. Ŝi etendis brakojn al la junulo kaj ekkriis ĝoje:

— Vin mi atendas, mia karega, jam kvin jarcentojn!

Kaj ili brakumis varme unu la alian.

Ivan kaj la junulo ĵuris vivi en eterna amikeco. La junulo kaj Libero geedziĝis. La tuta popolo jubilis kaj festis. Ivan fariĝis nuptopatro de la geedzoj. Nun ili profunde sin amas reciproke, helpas unu la alian frate. Ofte ili gastas unu al la alia. Kaj ne estas forto sur la tero, kiu povus disigi ilin.

Kolektu abonojn por „BE“! Ankoraŭ eblas aboni ĝin!



AKAD. MIĤAIL ARNAUDOV FORPASIS

Je la 18-a de februaro 1978 forpasis, enirinte jam en sian centjarigon, la elstara bulgara sciencisto akad. Miĥail Arnaudov. Forpasis granda amiko de la Internacia Lingvo Esp-o.

Akad. Arnaudov naskiĝis la 5-an de oktobro 1878 en u. Ruse. Li finis slavan filologion en Sofio, poste specialiĝis en Berlino, Prago, Parizo kaj Londono. Tridekjara li jam estis regula docento pri ĝenerala literatura historio kaj ekde 1914 — profesoro en la Sofia Universitato. En 1929 li estis elektita kiel membro de la Bulgara Akademio de Sciencoj.

Akad. Arnaudov estis multfacete dotita sciencisto kun plej variaj kreaĵ manifestiĝoj. Krom en la kampo de la literaturscienco kaj literaturhistorio — lia ĉefa agadsfero, li laboris ankaŭ en la kampo de la folkloro, etnografio, historio de la bulgara Renesanco, historio de la kulturo kaj popolsikologio. La bulgara scienco ne konas pli vastan, pli argumentitan kaj pli profundan esploron ol la studojn de akad. Arnaudov pri la bulgaraj ritoj, kutimoj kaj legendoj, kiuj prilumis la mondkonceptojn kaj socialajn tradiciojn de nia popolo kaj montris la riĉecon de la poezia heredaĵo kaj de la vivmaniero de niaj praavoj.

En la kampo de la literaturscienco akad. Arnaudov lasis fundamentajn verkojn kiel „Enkonduko en la literaturscienco“ kaj „Psikologio de la literatura kreado“ (eldonita ankaŭ en rusa lingvo en USSR). Li lasis originalajn literaturhistoriajn studojn pri la bulgaraj verkistoj Ivan Vazov, P. K. Javorov, Kiril Ĥristov, ankaŭ pri la verkaroj de Puŝkin, Gjote, Onore djo Balzak, La Roŝfuko k. a. Multajn verkojn li dediĉis al la agado kaj verkaro de la reprezentantoj de la Bulgara Renesanco: Neofit Bozveli, Vasil Aprilov, Seliminski, Ekzarko Josif, Georgi Rakovski, Paisij Hilendarski, Ljuben Karavelov k. a.

La verkoj de akad. Arnaudov estis alte aprezitaj ankaŭ eksterlande, pri kio atestas la fakto, ke li estis elektita kiel honora doktoro de la Hajdelberga Universitato (1936) kaj la Vestfalia Universitato en Mjunster (1941). Krome li estis membro de la scienca societo „Ŝevĉenko“ en Lvov kaj de la hungara literatura societo „Petjofi“.

Есперанто вече живее, принципите му са издържали суровия изпит на живота, който не търпи сапунените мехури на каприза, и ние можем да си пожелаем по-скорошното тържество на това скромно оръжие за свещените права на човека!

Esperanto jam vivas, ĝiaj principoj sukcese faris la rigoran ekzamenon de la vivo, kiu ne toleras la sap-vezikojn de la kaprico, kaj ni povas bondeziri pli baldaŭan triumfon de tiu ĉi modesta armilo por la sanktaj rajtoj de la homo!

Проф. М. Арnaudов, 1924 г.

Prof. M. Arnaudov, 1924 j

Lia krea agado kaj liaj sciencaj meritoj trovis altan pritakson fare de la bulgara ŝtato, Li estas kavaliro de la alta titolo „popola sciencaganto“ (1969) kaj de multaj ŝtatordenoj.

La morto de akad. Arnaudov estas granda perdo ankaŭ por la bulgaraj esp-istoj. Ili neniam forgesos la moralan apogon, kiun li donis siatempe al Esp-o. En letero al la forpasinta Ivan H. Krestanov, publikita en „Bulgara Esperantisto“, n-ro 8/1921, li esprimis sian pozitivan rilaton al la Internacia Lingvo. En la publika kunveno de la sofiaj esp-istoj je la 9 de novembro 1924, prezidita de li mem, li faris malferman paroladon (publikita en „Bulgara Esperantisto“, n-ro 3—4/1924). La esprimita starpunkto de akad. Arnaudov estis valoro kontribuo por la ĝisnunaj sukcesoj de Esp-o en Bulgario.

En Veliko Târnoro forpasis 70-jara

Venelin Drumev

multjara taganto en la sistemo de la Popola Klerigo, kiel instruisto, lernejestro, inspektoro en fako „Popola Klerigo“ ĉe la Urba Popola Soveto en V. Târnovo kaj estraro de tiu fako.



Esp-isto Drumev fariĝis kiel gimnaziano kaj ĝis la fino de sia vivo laboris aktive kiel E-lektoro, prezidanto de E-societo „Lumo“ kaj prezidanto de la Distrikta Estraro de BEA en V. Târnovo.

* Forpasis 56-jara en u. Peŝtera la instruistino

Ana Kukuŝeva

Naskita en Stara Zagora, ŝi tute juna aliĝis al la progresemaj ideoj kaj movado. Ana aktive partoprenis la kontraŭfaŝisman batalon kiel membro de la junkomunista laborista organizaĵo RMS. Edzino de nia konata E-aktivulo el Peŝtera Sterju Kukuŝev, ŝi elernis Esp-on kaj multe laboris por ĝia disvastiĝo en la lernejoj de Peŝtera, kie ŝi longe estis instruistino.



La 19-an de marto en Solio forpasis 96-jara

Ksenofon Jankov

En la periodo 1908—1910 li laboris tre aktive por Esperanto kiel sekretario de la Bulgara Esperantista Ligo kaj redaktoro de ĝia organo „Lumo“.

TRA LA GAZETARO

La dumonata scienca revuo „Istoriĉeski regled“, eldono de Bulgara Akademio de sciencoj, en sia n-ro 4/1977 aperigis la artikolon „Reeĝo de socialisma konkurado en Kazahia SSR inter bulgaraj laboristoj en la pasinto“ de la soveta historiisto Jozef Partnoj. Oni abunde citas kaj rekonas la agadon de la bulgaraj laboristaj esp-istoj en tiu tempo.

En ĵ. „Oteĉestven Zov“ — u. Vraca (16. XII): artikolo „La kreinto de Esperanto“ de Bojĉo Mladenov.

En la sama ĵurnalo (20. XII): informo pri arlaboroj por la Antaŭkongreso en Vraca la 25—28 de julio 1978).

En ĵ. „Septemvri“ — u. Bjala (16. XII): artikolo „Fenestro al la mondo“ de Simeon Baltaĝiev, okaze de la naskiĝtago de ĉ-ro Zamenhof.

deziras korespondi

Bulgario

Sijka Georgieva Simeonova, str. „Geo Milev“ 11, 6550 Ljubimec, okr. Haskovski (studentino — pri ĉt, interŝanĝas PM, BK).

Janka Ilieva Ĥristova, str. Rila 12, 8217 v. Aheljo, okr. Burgaski (studentino — pri ĉt, interŝanĝas BK).

Jordanka Dimitrova Tamahkjarova, str. Todor Grudov 47, kv. Meden Rudnik, 8118 Burgas (studentino — pri ĉt, interŝanĝas BK).

Kosju Nejkov, Poste Restante, 9000 Varna (kun ĉi pri astro, ĉio, foto kaj aliaj temoj)

DDR

D-ro Irmgard Dressler—Wohlgemuthstrasse 11, 1195 Berlin (47-jara scienca bibliotekistino)

Marina Hofmann — Kopernikusstrasse 60, 90 Karl-Marx-Stadt (17-jara desegnistino-lernantino)

Wilfried Hofmann — Kopernikusstrasse 60, 90 Karl-Marx-Stadt (40-jara inĝeniero, kursestro de Esperanto, serĉas korespondadon kun spertaj geesperantistoj, instruantaj E-on kaj tradukantaj en E-on)

Viola Hahn — 943 Schwarzenberg, Platz der Befreiung 9 (16-jara lernantino).

Müller Ilona — 943 Schwarzenberg, Walter Ulbrichtstr. 34 (18-jara).

Babette Kwaschny — 943 Schwarzenberg, W. Ulbrichtstr. 36 (16-jara lernantino).

Falko Meinhold — 943 Schwarzenberg, Bernsgrünerstr. 31 (15-jara lernanto).

Gabi Kwaschny — 943 Schwarzenberg, W. Ulbrichtstr. 36 (17-jara lernantino)

Thomas Weigel — 9442 Pöhl/Erzg. Vientriff 11 (17-jara lernanto).

Hartmut Bartsch — 943 Schwarzenberg, Otto Grothwohlstr. 35 (17-jara lernanto).

Hungario

Tutmonde deziras korespondi:

fraŭlinoj Mariana Andrasi (21-jara librotenistino), Margareta Beke (20-jara studentino), Margareta Lödi (22-jara higiena var-tistino), Judita Nagy (20-jara studentino), Juliana Smigroczi (20-jara studentino), Melinda Suranyi (20-jara studentino), Maria Szaszko (16-jara lernantino), Elizabeta Szaszko (20-jara komercistino), Elizabeta Purda (25-jara veldistino), Katarina Urban (20-jara studentino);

sinjorinoj: Terezia Jozsefine (27-jara ofi-cistino), Andrasne Pernyesz (58-jara emeritino).

Komuna adreso: Esperanto-grupo „Amikeco“ H-5100 Jaszbereny, pf. 70, Hungario